

la plenumo de la atenco. Kaj tio ankaŭ okazis 18.6.1942 en la kripto de la ortodoksa preĝejo en Ressel-strato, Prago.

La patro de Heidrich posedis privatan muzik-lernejon en Halle kaj la juna Reinhard estis edukata kiel talenta muzikisto, bone reganta violonludon. La familio esperis, ke li fariĝos heredanto de la konservatorio. Sed li jam de sia juneco pro malbona edukado fare de sia patrino, suferis pro troa ambicia honoravido. Fariĝi posedanto de konservatorio ne kontentigis liajn ambiciajn pretendojn.

Kiam li soldatservis, lin satigis aparteno al maristaro, kie li baldaŭ atingis rangon de leŭtenanto. Kaj 1.7.1928 li estis rangaltigita je ĉefleŭtenanto en siaj 24-a jaroj. Sed, la junan, honoravidan oficiron atingis malfeliĉego pro la maldungo el servoj de maristaro je la 30.4.1931. La kaŭzo troviĝis en la fakto, ke li faris fianĉi-promeson al juna studentino el Potsdamo kaj intertempe proponis edziniĝon al sia nova konatolino Lina von Osten. Patro de tiu ĉi trompita studentino anoncis tion al marista stabo en la urbo Kiel kaj postulis satisfakcion. Honora komisiono de maristaj oficiroj en Kiel pride-mandis Heidrichon. Verŝajne minacis al li nur malhonoriga mallaŭdo.

Sed li antaŭ la honora komisiono, kiun estris admiralo Hansen, arogante



malkonfesis sian eraron, ĉion malmolkorece puŝfaligis al la studentino. Fine la komisiono decidis, ke lia konduto ne konvenas al kodekso de maristaj oficiroj kaj decidis pri lia maldungo el maristaro. Li ankoraŭ petis la prezidenton de Germanio pri punpardonon, sed

la prezidento Paul von Hindenburg lian peton malaprobis.

En la tempo de ekonomia krizo li fariĝis senlaborulo kaj restis sen financaj rimedoj. En la majo 1931 li kun sia fianĉino Lina von Osten, kiu devenis el malriĉigita nordgermana nobelaro, veturis al Halle, por peti de sia familio financan subtenon. Tiam estis en la lando pli ol 4,5 milionoj da senlaboruloj, komence de la j. 1932 tiu nombro atingis jam 6 milionojn. La ekono-

mia krizo malbone efikis eĉ al privataj muzik-lernejoj. Mankis muzikler-
nantoj.

La familio Heidrich en Halle malfacile sin tenis sur la financa nivelo. Estis certa, se Reinhard ne ricevus frue bone pagitan laboron, Lina longe restos sen la sopirata fianĉo. Ŝi estis jam bone konatiginta kun la naziisma propa-
gando kaj bone sciis, ke la nova movado, politike kontraŭ-maldekstrula,
havas subtenon de industriaj regionoj. Fine ŝi, ŝiaj familianoj kaj iliaj ku-
nuloj sukcesis; Heinrich Himmler akceptis junan eksoficiron en la servojn
de la trupoj SS. (Organizaĵo, servanta kiel polico de naziistoj).

Ili fariĝis amikoj kaj komune planis la murdojn al judoj kaj aliaj loĝantoj,
kiuj ne konvenis al la naziisma ideologio. Tiumaniere Reinhard Heidrich
plenkreskis, ankaŭ pro sia troa ambicia honoravido, al unu el la plej agemaj
naziistaj murdistoj en j.1932 – 1942.

Post la kruelegaj agoj de naziistoj, la likvidoj de la vilaĝoj Lidice kaj Ležá-
ky – murdoj de ĉiuj viroj de iliaj vilaĝoj kaj pluaj teroraj agoj kontraŭ civi-
luloj, gvidis diplomatojn de Anglio, al nuligo de la „Munkena interkonsen-
to“ el 1938 kaj decidis pli subteni la ĉeĥoslovakon ekzilan kabineton en
Londono. Favore oni akceptis ankaŭ la proponon de D-ro Edvard Beneš,
elloĝigi naziistojn el la respubliko post la j. 1945.

(Mi ĉerpis el la ĉeĥa traduko de Robert Gerwarth: Reinhard Heydrich –
Hitlerův Kat /Reinhard Heidrich – ekzekutisto de Hitler/ kaj el E-Vikipe-
dio).
Stanislav Štefan

Nigra pluvo romano pri atombombitaj homoj *)

Nigra pluvo estas longa romano de *Ibuse Masuzi* publikigita en la jaro
1966. La aŭtoro verkis ĝin surbaze de „Taglibro Sigematu“ de *Sigematu*
Sizuma, kiu estis lia hejmloka konato. La romano temas pri viro kaj lia
nevino, kiuj transvivis la atombomban atakon en Hiroŝima kaj kiuj estis
atakitaĵ per t.n. „Nigra pluvo“ post la eksplodo de la atombombo. Ili poste
revenis en sian montaran hejmlokon.

La aŭtoro priskribis ilian maltrankvilan sekvan vivon. La nevino suferis pro la „nigra pluvo“, ĉar la familio de ŝia fianĉo rifuzis permesi edziĝon



pro tio, ke ŝi transvivis la atakon. Tio gvidis ĉe ŝi al malsaniĝo. La romano montras la realan ĉagrenon de la „Atombombitaj“ homoj. Monumento por memorigi la romanon staras en la parko *Tutuzigaoka* apud la patra domo de *Sigematu* en la urbeto *Sanwa* (nun *Zinsekikōgen*) de la subgubernio *Zinseki*. La romano estis filmita de la reĝisoro *Imamura Syoxhei* en la

jaro 1989 kaj oni prezentis ĝin ankaŭ eksterlande kun la titolo „Black Rain“ (Nigra pluvo). *Sigematu* verkis la taglibron en sia hejmloko laŭ siaj rimarkoj, por sciigi la mizeron, kio kaŭzis la atombombon al idoj.

En lia manuskripto oni legas multajn scenojn, pri homoj kiel brulantaj fostoj, leviĝanta meduzforma nubego, patrino portanta surdorse sian mortintan filinon... Tiuj scenoj ankaŭ aperas en la romano de *Ibuse* kaj tial oni opinias, ke la romano havas faktan karakteron de literatura dokumento.

El la libro „Pli sciu pri Hiroŝima“, libro eldonita de Hiroŝima Esperanto-Societo.

Sendis Blanka Hužerová, korektis Stanislav Štefan

*klarigo: *) homoj, kiuj transvivis la atombomban atakon je Hiroŝimo kaj Nagasaki en aŭgusto 1945.*

